Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 23 – 26 novembro

# Migranta Hirundo

25-a de novembro 2023, numero 5

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, prezentis sin dum la VK

La unua UK en Afriko, 3 – 10 aŭgusto 2024. Tiel gravas ĝi kaj tiel scivolemas pri ĝi la homoj! Hodiaŭ renkontiĝo kolektis aron da interesigantoj kaj aron da demandoj. Bedaŭrinde ne tre bona retkonekto ne permesis al John Magessa kaj Daniel Kanilpou rakonti kaj montri ĉion, kion ili volis rakonti kaj montri, sed helpis ilin Fernando Maia kaj Petro Baláž. Certe la unuaj demandoj temis pri la ekskursoj, ĉu vere eblos vidi tian neordinaran naturon, kaj ĉiujn tiujn elefantojn, zebrojn, flamengojn, kiuj estis montritaj al ni en la *Unua*



*Bulteno*? Jes, apud Aruŝo estas multegaj naturaj parkoj, kiujn eblas viziti. Sed ne forgesu ke ja dum kongreso necesas almenaŭ iomete kongresi ;) Por konatiĝi kun



bestoj, grimpi Kilimanĝaron kaj admiri bluan maron – ekzistas antaŭkongresoj kaj postkongresoj. Kaj respondante al demandon de biciklistoj, jes, estas multegaj lokoj por bicikli, sed ne faru tion en naciaj parkoj kun sovaĝaj bestoj! John Magessa rakontis, ke eblas trovi bonajn vojojn ĉirkaŭ la parkoj kaj samtempe ekskursi kaj bicikli.

Pli singardemaj ĉeestantoj demandis pri necesaj vakcinoj kaj ĉu estas tolerebla la klimato. Sansistemo de Tanzanio estas ege moderna kaj kongresanojn atendas nenio aparte danĝera, sed estus bone konsultiĝi pri tiu aŭ alia vakcino kun kuracistoj en via lando. Pri la klimato ja estas tute neniuj problemoj. Dum la kongreso en Tanzanio vintros, estos ĉirkaŭ 20-25 gradoj laŭ Celsio, do tre komfortos la vetero.


Aperis demandoj pri vizoj por ne afrikanoj kaj pri kotizoj por afrikanoj. Detaloj pri vizoj aperos en la *Dua Bulteno* kaj kotizoj por ĉiuj afrikanoj nepre estos specialaj.




La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Konferenca Centro (AICC), la plej grava en Tanzanio, profesie ekipita konferencejo, ĉirkaŭita de plurnivelaj hoteloj, piedpaŝe atingeblaj de la kongresejo.

**La Universala Kongreso de Esperanto venos al Tanzanio! Aliĝu al la 1-a UK en Afriko: uk.esperanto.net/2024**

# Estraro de UEA kaj la Ĝenerala Direktoro respondis demandojn ĉe VK




La 25-an de novembro la Estraro de UEA kaj la Ĝenerala Direktoro havis ĝojon virtuale renkontiĝi kun partoprenantoj de la VK, prezenti sin, mallonge rakontis pri siaj taskoj kaj zorgoj. Kaj certe, respondi la demandojn.

Ne estingiĝas la demandoj pri estonto de la Biblioteko Hodler kaj Centra Ofecejo. La biblioteko trovis novan hejmon en sino de la Pola Nacia Biblioteko (pli detale legu en la revuo *Esperanto* n-ro 7-8 de la jaro 2023), kaj la arkivoj de UEA restas en Aŭstria Nacia



La arkivoj de UEA en Aŭstria Nacia biblioteko

biblioteko (pli detale legu en la revuo *Esperanto* n-ro 12 de la jaro 2023). Duncan Charters substrekis, ke la enketilo montris interalie gravecon de la libroservo,



En Pola Nacia Biblioteko

kies estonto dume ne estas certe konata, sed kiu nepre daŭre funkcios. La sidejo de UEA jure dume restas en Roterdamo, Nederlando. Tie nun daŭre laboras kelkaj oficistoj. Vendo de la domo ne estas nun tre urĝa afero, ĉar oni prognozas, ke eble baldaŭ la domo povas valoriĝi. Al la demando, ĉu translokiĝas ien fizika sidejo, venis respondo, ke en rapide ŝanĝiĝanta mondo kunlaborantoj estas disŝutitaj tra la tuta mondo: biblioteko en Pollando, kongresa fako en Slovakio kaj tiel plu. Novaj tempoj postulas novajn decidojn.

Same okazas ekzemple, kun la *Jarlibro*. Ne multaj nun vere deziras havi ĝin paperforme, des pli ke ni jam kutimiĝas al tre rapida ricevo de iu ajn informo, sed ĵus printita la libro jam estus parte ne aktuala. Jen estas la ĉefa kialo, sed ne nur la multekosteco de presado nuntempe. La ĜD atentigis, ke ne tiom multe kostas la presado, kiom la malfacilega laboro pri la libro, kiu estas necesa por fari interalie bonan retan version. Sendube bezonatan. Estas necesaj diligentaj atentemaj kaj akurataj kunlaborantoj. Sed ja restas ŝatantoj de paperaj versioj! François Lo Jacomo eĉ montris al la spektantoj *Migrantan Hirundon*, kiun li plenkolore printas por teni en manoj kaj lasi por arkivo. Por tiaj ŝatantoj, kies deziroj ankaŭ estas ege estimindaj, eblus printi ne ĉiujaran, sed ekzemple trijaran almanakon.

Venis ankaŭ demando pri la kongreso de la jaro 2025. Certe ne estas jam findecido pri la loko, sed daŭras laboro kun kelkaj grupoj, ankaŭ kun turismaj agentejoj. Estis intereso de ĉeha kaj skota grupoj, kaj aliaj grupoj, kiujn oni dum ne malkaŝas. Fernando Maia atentigis ke zorgi pri prezoj, ebloj, kaj plej grave garantii al kongresanoj bonan sperton dum estonta kongreso estas la ĉefa tasko.

Ankaŭ interesis vizitantojn ekologiaj demandoj. Estraranoj atentigis pri la fondaĵo Klimato. Venas donacoj nome de UEA al diversaj laŭtemaj instancoj. Interalie eblo partopreni UK defore kaj aparte la Virtualajn Kongresojn estas solvo por tiuj, kiuj zorgante pri la ekologio ne emas flugi aviadile. La Estraro, antaŭe renkontiĝinta du fojojn jare en Roterdamo, nun decidis renkontiĝi virtuale kaj la ekologia kaŭzo de la decido estis unu el la plej gravaj.

**Vi povas esti aŭtoro de *Migranta Hirundo* kaj la *Reta Revuo*! Por kontribui, skribu al la redakcio**

**revuo.esperanto@gmail.com**

# Lerni dancante

Por ke lingvolernado estu efika, ĝi devas esti amuza. Helpe de la ludo *Vortoj* vi povas praktiki lingvojn kaj ripeti vortojn… dancante! Tiun ludon vi ludas per speciala tapiŝo, do la ludo helpas ne nur plivastigi viajn konojn, sed ankaŭ plibonigi vian sanon. Ĝia nomo estas tute intence en Esperanto, ĉar ĝi estis koncipita en la Esperanta organizo E@I.


Prezento de *Vortoj* dum UK en Torino.
Foto de John Huang

La ludon dum VK prezentis la 25-an de novembro Michal Matúšov (KuboF Hromoslav). Por ludi ĝin venu al https://vortoj.net, kreu senpagan konton kaj ekludu!

# 10 jaroj Esperanto-kurso en Vieno

★ Walter Klag, Vieno
Kontribuis Renate Klag

Ekde januaro 2014 mi okazigas Esperanto-kursojn ĉefe por studentoj en diversaj kafejoj en Vieno.

Ĝis novembro 2023 okazis 125 kunvenoj, kun 313 partoprenantoj el diversaj landoj. Ĉefe venas junaj homoj, preskaŭ nur studentoj, ĉar la varbado okazas en diversaj universitatoj pere de afiŝoj. Foje venas ankaŭ pli aĝaj homoj por lerni kaj diskutadi.

Tiu kurso por tutkomencantoj konsistas ĉiufoje nur el la unua leciono. Oni lernas la alfabeton, la akcenton, la finaĵojn -as, -is kaj -os, la afikson "mal", la sufikson "ig" kaj la kolorojn. La kurso daŭras 45 minutojn, sekvas diskutado kaj konversacio. Aliĝo ne necesas. Dua aŭ plia leciono okazas post interkonsento.


La spertoj montras, ke varbado pere de pendigitaj afiŝoj en formato A4 kaj A3 kaj pli grandaj estas la plej efika metodo varbi por la kurso. Averaĝe bezonatas 50 afiŝoj por havi unu lernanton en la kurso. Ofte okazas, ke iu fotas afiŝon kaj sendas la foton al iu alia, kiu poste venas al la kurso. La plej juna partoprenanto estis 11-jaraĝa. Li vizitas la francan gimnazion en Vieno. Lia patrino estas rusino, lia patro franco.



Afiŝo (germane Plakat), eldonkvanto en unu jaro 3000

# Ĝuu VKon kaj UKon !

Tuj antaŭ la komenco de 4a VK aperis la filemto pri 108-a UK de 2023 en Torino, Italio, farita de fotemulo s-ro So Jinsu.




Li kutimas foti kaj filmi esperantajn gravajn eventojn, kaj restigas la rezutojn por historio de nia movado.




Oni povas spekti ĝin per lia jutuba kanalo, sojinsu1: https://mallonge.net/16r.

Troveblas ankaŭ filemtoj de UKoj de la jaroj 2016, 2017, 2019, 2022, kaj 6a Afrika Kongreso, kaj aziaj eventoj ekde 2016.

# Kiel aktive partopreni la VK-spektaĵojn ankaŭ post la VK?

Amri Wandel

Ne ĉiu konscias ke la VK-platformo resos alirebla ĝis la jarfino. Tio signifas ke multaj programeroj estas re-spekteblaj (kategorio "spektaĵo" aŭ blua kvadrateto en la programtabelo en la retligo ĉi-sube), ĝis la fino de decembro.

Inter ili troviĝas 7 prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj 5 prelegoj de la Scienca Kafejo (vidu la detalojn en la aldonita tabelo de la VK-Scienca Programo).

**Eble surprizos vin, ke vi eĉ povas skribi demandojn re-spektante tiujn programerojn, kaj eventuale (almenaŭ en la IKU- kaj SK-prelegoj) ankaŭ ricevi respondojn longe post la viva okazo de la programero.**

Eĉ kiu ne aliĝis povas impresiĝi per la programtabelo: https://vk.esperanto.net/2023/programo/?tz=UTC (ekzemple la ĉi-supra retligo montras la tempon laŭ UTC, eblas modifi por via horzono). Se vi tamen aliĝos al la VK (https://vk.esperanto.net/2023/aligxilo) vi povos partopreni la re-spekteblajn programerojn ĝis la fino de decembro.

| VK tago/horo | Preleganto | | Temo | Konciza Titolo |
|---|---|---|---|---|
| 23, 15:00-16:30 | Wandel | Amri | Astronomio | La Serĉo de Ekstertera Vivo: eksterplanedoj, NIFOj kaj SETI |
| 23, 17:00-17:45 | Tuider | Bernhardt | Esperantologio | La arkivo de la Universala Esperanto Asocio |
| 23, 17:00-17:45 | Pennacchietti | Fabrizio | Esperantologio | La DNA de Esperanto |
| 23, 23:00-23:45 | Goodall | Grant | Lingvistiko | Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo |
| 24, 14:00-14:45 | Lo Jacomo | François | Matematiko | La matematikaj kalkuliloj |
| 24, 13:00-13:45 | Baláž | Peter | Robotiko | Robotoj alvenas: aŭtomatigo, artefarita intelekto, senlabor |
| 24, 18:00-19:30 | Tonkin | Humphrey | Literaturo | Boulton – Ŝekspiro – Koriolano |
| 24, 17:00-18:30 | Goes | Heidi | Lingvistiko | La kikonga lingvaro |
| 24, 23:00-23:45 | Raola | Orlando | Kemio | Fizikaj kaj kemiaj karakterizoj de gemoj |
| 25, 7:00-7:45 | Fontaine | Joël | Fiziko | Danĝera lumo |
| 25, 19:00-18:30 | Labrie | Gabriel | Sociologio | Lingva pejzaĝo en lingve diversecaj urboj: socilingvistiko |
| 26, 5:00-5:45 | Tarracchini | Ermanno | Pedagogio | De la pedagogio ĝis la neŭropedagogio |
| 26, 15:00-16:30 | Jacobsen | Jesper | Fiziko | Kvantuma interplektiteco: la mistera kvantuma gluo |

## Ne preterlasu!

**Fermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (4-a VK):**

**La fermo okazos la 26-an de novembro 2023 je la 17-a horo UTC.**

**Gvidas Fernando Maia Jr.**




## Asocio Nova Familio

Vidu la aktualan prezentaĵon pri agado de la asocio:

https://mallonge.net/16q